



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2012

ESPERANTO



Kara Leganto, mi elkore salutas vin okaze de 125-jara jubileo de nia kara lingvo. Tiu jubileo estas duobla por mi, ĉar ĝuste 26an de Julio, sed 1987, kiam ni festis centjariĝon de Esperanto, naskiĝis mia filino Solomeo, kiu baldaŭ fariĝos 25-jara. Tio okazis tuj post mia reveno de la IJK en Krakovo, mi eĉ pasigis unu tagon en Varsovio, kie komenciĝis jubilea UK.

Nia estimata prezidanto, d-ro L. Kordylewski antaŭ nelonge revenis de la kongreso Esperanto-USA kaj kunportis interesan rememoron de eksa ŝikaganino Doroteo (vd suban tekston) – dankon al ŝi. Pro sia foresto dum la lasta kunsido s-ro prezidanto petis min prepari ion interesan: mi ne longe pensis kaj propones al aŭskultintoj temon “Esperanto kaj sporto” (tiam okazis piedpilka Eŭro’2012 en Pollando kaj Ukrainio kaj, de la dua flanko, tuj post E-jubileo ni atendas Olimpikajn ludojn en Londono).

Unu el la plej gravaj de niaj tradiciaj eventoj – E-pikniko – okazos en kelkaj tagoj. Pri tiuj ĉiuj eventoj bv legi plue. –La Redakcio

Roy kaj Doroteo Holland



Iam dum la 1940-jaroj s-ro Holland rimarkis en ĵurnalo de Ĉikago, kie ni tiam loĝis, artikolon pri letero el Ĉeĥoslovakio, ricevita de la urbestro de Ĉikago en iu nekonnata lingvo. Finfine oni konstatis, ke la letero estis en Esperanto, kaj oni trovis la tradukinton, kiun Roy poste kontaktis, ĉar kiam li estis junulo li legis en religia gazeto de sia patro artikolon pri tiu lingvo, kiu ege allogis lin.

Baldaŭ poste Roy trovis en butikoj de uzitaj libroj ekzempleron de Esperanto-lernolibro, kiun ni ambaŭ ekstudis. Intertempe ni restis en kontakto kun la Esperantisto (kies nomon mi bedaŭrinde ne memoras), kiu klarigis, ke dum la Dua mondmilito la antaŭe aktiva Esperanto-societo de Ĉikago ĉesis funkcii. Do, kune ni kontaktis antaŭajn membrojn kaj aranĝis ĉiu-monatajn kunvenojn en la urbcentro (kiu daŭras ĝis nun – red.). Dum tiu tempo s-ro Holland kaj mi akiris multajn korespond-amikojn, ĉefe el Eŭropo, kaj iun someron ni vizitis 26 el ili en 13 eŭropaj landoj. Kiam ni revenis, ni flue parolis Esperanton! Do, ni kalkulis, ke se la membroj de la Ĉikaga Societo parolus same longe, kiel ni faris dum tiu somero, ili estus devintaj ĉeesti la ĉiu-monatajn kunvenojn dum dek jaroj!

Roj kaj mi restis aktivaj en la Societo ĝis kiam li pensiĝis kaj ni translokiĝis al Fayetteville, Arkanzaso (verŝajne, dum la 1950-aj jaroj). Do, niaj spertoj kun la Esperantistoj de Ĉikago estis la komenco de niaj multnombraj mirindaj aventuroj en Esperantio!

–Dorotea Holland,
Santa Barbaro, Kalifornio

Esperanto kaj Sporto

Kiam nia prezidanto L. Kordylewski ekpetis min anstataŭigi lin kiel prelegonto en nia E-societo, mi tuj konsentis, sed ekcerbumis pri la temo de la kunveno. En tiu tempo



en niaj gepatraj landoj Pollando (de Leszek) kaj Ukrainio (mia) okazis piedpilka turniro Eŭro-2012, ĉampionado, kiu laŭ populareco okupas lokon post someraj Olimpikoj kaj simila monda turniro. Do, decidis mi, parolu pri sporto. Poste evidentiĝis, ke ekzistas Monda E-Ligo por Sporto (MELS), ĉefaj celoj de kiu estas (1) disvastigo de E-o inter la praktikantoj kaj ŝatantoj de sporto kaj batalartoj, kaj (2) popularigo de sporto kaj batalartoj pere de E-o. Retejo de MELS (www.esperanto.org/mels) invitas gesamideanojn viziti Olimpikojn en Londono (fine de Julio). Poste mi ekmemoris, kiam partopreninte IJK-on en Krakovo dum la jubilea (centjariĝo de E-o) 1987 jaro mi ludis piedpilkon en la teamo “Cetero de la mondo” kontraŭ polaj gesamideanoj. Rezulto ne gravas, gravas la fakto.

La vorto sporto havas sian originon en la latina verbo deportare, kiu interalie signifis “eliri trans la pordojn”, do eliri el la ĉirkaŭurba muraro por ekzerciĝi aŭ sporti en la kamparo. El tiu ĉi verbo devenas, interalie, deportar (okcitane kaj hispane) kaj desporter (france, kun la signifo de “amuziĝo”). En la angla lingvo, tiu ĉi lasta vorto ekaperis en la 14-a jarcento kiel disport, kaj en la 16-a jarcento ĝi alprenis sian nunan formon, sport.

“La enpenetro de Esperanto en la sportan afergvidon kaj aranĝadon de sportaj okazintaĵoj daŭris tre longe. Tio

estas komprenebla, se ni konsideras, ke la homoj okupiĝintaj pri E-o kaj pri sporto estis komence tute alispecaj, kaj ankaŭ la klopodoj de kelkaj fervoruloj, vivteni apartan Esperantistan sportan asocion aŭ ligan, re aŭ eĉ ŝovinismaj burĝulaj sportasocioj ne uzas Esperanton, eĉ kelkfoje kontraŭbatalas ĝian enpenetron, la laboristaj sportistoj (kiuj precipe depost la milito tre multnombriĝis) rekonas ĝiajn avantaĝojn kaj utiligas ilin. La unua eblo je uzado de E-o estas la preparaj skribaj laboroj de grandaj internaciaj sportfestoj. Ĉirilate, Esperanto jam plurfoje pruvis sian taŭgecon; ekzemple, dum la internacia laborgimnastika kunveno en Nurenbergo (1929), la dua laborista olimpiado en Vieno (1931) kaj la laborista sportfesto en Ústí nad Labem (Ĉeĥoslovakio, 1933). Dum tiuj ĉi festoj estas aranĝitaj ankaŭ interfratiĝkunvenoj de la Esperantistoj, kiujn ĉiam tre multaj Esperantistoj partoprenis. Deĵoris dum la festoj ankaŭ multaj Esperantistoj kiel informantoj, gvidantoj, ktp. Oni jam uzis Esperanton ankaŭ por sportteknikaj celoj: unua provo dum la Spartakiado en Moskvo (1931). Tamen prezentas grandan malhelpon ĉi-rilate la manko de internaciskale aprobita sportteknika vortaro. Nun jam la Vienaj Naturamikaj Esperantistoj okupiĝas pri tio. E-o bone prosperas ankaŭ en la turisma branĉo de sporto. Inter la naturamikoj ekzistas preskaŭ en ĉiuj urboj grupoj Esperantistaj kaj multaj el ili uzas Esperanton kiel helplingvon dum siaj eksterlandaj ekskursoj, aliflanke ĉe organizo de vizito de eksterlandanoj en siaj hejmoj. Ni povas konstati tre bonan kontakton ankaŭ inter la Naturistoj (ano de natura vivmaniero: vegetaranoj, nudistoj, kaj tiel plu) kaj Esperantistoj en Francio, Germanio, Italio, Finnio, Aŭstrio, kaj tiel plu” – tiel informis pri nia temo “Enciklopedio de Esperanto”.

La Olimpikaj ludoj de la nuntempo estas iniciatitaj de la barono Pierre de Coubertin, kiu en la jaro 1894 fondis la Internacian Olimpikan Komitaton. Laŭ lia idealo la ludoj kunigu sportistojn de ĉiuj popoloj, haŭtkoloroj kaj religioj por konkuri en paca etoso. En la jaro 1896 en Ateno okazis la unuaj Olimpikaj ludoj de la nuntempo (295 viroj el 13 landoj en 42 konkuroj), kaj ekde tiam ili okazas – krom interrompoj pro la mondmilitoj – ĉiun kvaran jaron en malsama loko. Ekde la jaro 1924 ankaŭ vintraj ludoj okazas: unue samjare kiel la someraj ludoj, sed ekde 1994 (pro komercaj kialoj) en dujara alterno kun ili. La oficiala frapfrazo de la olimpika movado estas pli rapide, pli alte, pli forte.

Nuntempaj Olimpiaj ludoj estas iom pli junaj ol E-o, sed tiu festo estas ege populara sur la Tero. Nia tasko, tasko de E-istoj, enpenetri kun nia kara lingvo en la mondan sportan movadon kaj enkonduki Esperanton inter sportistoj kaj ŝatantoj. Ĉu reale? – Jes!

–Araneo

Esperanta Pikniko

Ni festos la 125 datrevenon de Esperanto dum la ĉi-jara E-pikniko, kiu okazos dimanĉe, la 22an de Junio inter tagmezo kaj 4 pm je la suda flanko de la urbo Ĉikago, en Dan Ryan Woods (8300 S. Western kaj 83a Strato). Ni uzos tegmentitan spacon n-ro 3 (grove 3). Vidu mapon. Bonvolu konfirmi la ĉeeston, prefere uzante “meetup”-on <http://www.meetup.com/Esperanto-Chicago/events/67204912/>. La partopreno estas senpaga, sed ne foegesu pri manĝaĵoj-trinkaĵoj, kiujn vi bezonas. Bonvolu informi ĉu kaj kiel vi povos kontribui al la pikniko. Eblas komuna vojaĝo per aŭto de la centro de la urbo (Union Station) – bonvolu anonci sin se vi deziras (312-328-1338)

–Organiza Komitato



Adreso:

Esperanto Societo de Ĉikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Roberto Stalzer
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Julio – Pikniko okaze de la 125-a datreveno de IL ĉe Dan Ryan Woods, 83rd St. kaj Western Av., Grove 3

28an de Aŭgusto – E-USA kongreso en Teksaso, EEU kongreso en Galivo, UK kaj IJK en Hanojo

